

N° 184  
octobre  
novembre  
décembre  
2018

# LA INFORMILO

N° 184  
oktobro  
novembro  
decembro  
2018

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

ESPERANTO  
2018  
*Justa komunikado*

Esperanto  
la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

esperanto  
France-Est

## ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

### ESPERANTO

regroupant  
les départements

**Bas-Rhin (67)**

**Haut-Rhin (68)**

**Meurthe-et-Moselle (54)**

**Meuse (55)**

**Moselle (57)**

**Vosges (88)**

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

**FR-54000 NANCY**

**ABONNEMENT / ABONO**

**Papera versio: 18€**

**Reta abono: 7,50€**

## BONVENON AL VIKIPEDIO

La libera enciklopedio redaktebla de ĉiuj.

251 853 artikoloj en Esperanto

326 aktivaj redaktantoj

117 366 unikaj vizitantoj monate (plus 33 572 per  
poŝtelefono)

Helpo · Kategorioj · Demandoj · Regularo · Portaloj

## UN BEAU SUCCES POUR VIKIPEDIO, LA VERSION EN ESPERANTO DE WIKIPEDIA



VIKIPEDIO  
La libera enciklopedio

VIKIPEDIO, la version en espéranto de l'encyclopédie en ligne Wikipedia, a atteint en septembre 2018 son 250-millième article. La version en espéranto fut créée en novembre 2001 par le jeune informaticien américain Chuck Smith aidé de Jerry Muelver et de Stefano Kalb. Elle parut le 2 janvier 2002 et comptait alors 300 pages. Compte tenu du nombre d'articles en espéranto elle arrive actuellement en 32-ème position !

Al ĉiuj niaj legantoj ni deziras plej feliĉan  
novan jaron 2019 kaj sukcesojn en viaj  
Esperanto-agadoj.

## La 26-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO 29. 9.-6. 10 2018



Jen la naĝejo de la hotelo en Salou, kie okazis tiu Internacia Semajno. Fakte tute ĉe la marbordo, sed iom for de la urbo-centro. Ĝi troviĝas sude de Barcelono, facile atingebla per regulaj busoj ekde la flughaveno. En la hotelo la Esperanto-grupo disponis pri aparta vasta salono por ĉiuj siaj programoj. Refoje la lastjara teamo transprenis la tutan organizadon kun kiel ĉef-organizantino Rosa López. Eblis konstati la kompetentecon de la diversaj kunorganizantoj, interpretistoj kaj ceteraj kunhelpantoj. Tial ĉi-tiu semajno estis vere alloga kun novaj programeroj.

**Jen raportas pri ĝi Liba Gabalda.**

### La 26-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO SALOU 29. 9.-6. 10. 2018

La kvinan kaj la lastan fojon ni ĝuis la Internacian Semajnon en Salou ĉe la Ora Marbordo. Salou estas grava turisma urbo situanta je 10 km sude de *Tarragona*. Ĝi estis fondita en la 6a jarcento antaŭ Kristo kaj posedas kelkajn belajn plaĝojn. Proksime troviĝas granda amuzparko *Port Aventura*.

Al la aranĝo aliĝis 100 geesperantistoj el 12 landoj. Ni loĝis en la ekstrema parto de la urbo en hotelo *Best Negresco*, kie en la jaro 1989a okazis la 41-a fervojista kongreso. Post la alveno kaj disdono de dokumentoj ni eksciis pri la semajna programo kaj la organizantoj parolis pri la estonto de la ŝatataj Semajnoj, kiuj ne plu okazos en la Kataluna parto de Hispanio.

La dimanĉan inaŭguron ĉeestis la urbestro de Salou s-ro Pere Granados, kiu kore bonvenigis nin





kaj deziris sukceson al la evento. Poste ni fotiĝis kun li ĉe la hotela naĝbaseno. Posttagmeze ni promenis laŭlonge de diversaj plaĝoj ĝis la centro de la urbo. Vespere okazis en gaja etoso interkonatiĝo kun ŝaŭmvino kaj kelkaj dolĉaĵoj kaj aliaj manĝaĵetoj. Bele kostumita hispana paro dancis *zarzuela* kaj Rosa Lopez muzik-ritme klakis per kastanjetoj.

Dum la Semajno sekvis programeroj, diskutrondoj pri diversaj temoj, interesaj prelegoj, aljuĝo de Premio Ada Sikorska, deklamado de poeziaĵoj, komuna kantado kaj videa prezento pri kataluna folkloro kaj kutimoj. Posttagmeze estis tempo por banado aŭ promonado en naturo ĉe la maro.

Inter la prelegoj necesas substreki tiun de Pere Navarro Rosines pri: “Ĉu vi scias, ke nia manĝo venas de la suno?” Li klarigis la bioĥemian procezon en plantoj, algoj kaj kelkaj bakterioj, pri pigmentoj kaj ĝenerale pri fotosintezo. Ĉio estis ilustrita



per multaj bildoj. Barbara Pietrzak el Pollando prelegis pri esperantista komunikado, pri famaj esperantistoj, pri klopodoj ĉe Unesko kaj aliaj interesaĵoj el Esperantio. Zita Blaust el Danio parolis pri siaj spertoj kaj impresoj dum la 12-a Internacia Himalaja Renkontiĝo en Nepalo kaj pri la hinda virino *Sindutaj Sankal*. Javier Alcalde prelegis kaj diskutis pri pacismo, pri la roloj de esperantistoj dum la granda milito (1914-1918), pri la influo de la Esperanto-movado. Lia prelego titoliĝis “Antaŭ unu jarcento-Esperanto kaj la unua mondmilito”. Abel Montagut prezentis “La poemo de Utnoa kaj la Diluvo”. Luz Vázquez gvidis rondon pri kulturtemoj, esencaj trajtoj de Esperanto-kulturo. Dalia Pileckienė parolis pri stereotipa pensmaniero en nia vivo el psikologia vidpunkto. En kelkaj grupoj ni plenumis diversajn taskojn. Ángel Argilos gvidis rondon pri deklamado de poezio en Esperanto. La ĉi-jara Premio Ada Sikorska estis aljuĝita al Barbara Pietrzak, kiu multe






laboras por Esperanto. Ŝi persone konis Ada-n kaj ili komune laboris por Esperanto.

Kiel lastjare ankaŭ ĉi-foje ni ĝuis "Peĉakuĉon". Ĝi estas serio da bildoj kun komentarioj de la aŭtoroj. Ni eksciis pri tornilo, pri irlanda historio kaj pri Patriko, pri vojaĝo laŭ usona vojo 66a, pri radioaktiveco kaj atomoj. Ni spektis kastelojn en Dordono kaj tridimensiajn bildojn el Koreio.



Okazis duontaga ekskurso al la proksima urbo *Reus*, kie ni promenis ĝis la centra parto de la urbo. Tie ni povis vidi kaj admiri de ekstere la *Casa Navás*. Poste ni vizitis "Gaŭdi Centron" spektante filmon kaj diversajn eksponaĵojn. En *Centre de lectura* ni vizitis ampleksan bibliotekon kun multaj libroj kaj galerion de bildoj. La tuttaga ekskurso direktiĝis al apudmara urbeto *Sitges*. Tie ni vizitis muzeojn *Maricel* kaj *Cau Ferrat* (domo-ateliero de la kataluna verkisto kaj pentristo *Santiago Rusiñol*, kiu tie vivis). Ekde la fino de la 18a jarcento ĝis la komenco de la 19a jarcento tie establiĝis konstanta komercado kun amerikaj kolonioj. Impona estas la preĝejo Sankta Bartolomeo kaj Sankta Tekla el la deksepa jarcento. En la urbocentro ni promenis tra mallarĝaj pavimitaj stratetoj kaj admiris kelkajn luksajn domojn. La



urbon oni nomas hispana *Saint Tropez*. Ekde la jaro 1967a ĉi tie regule okazas internaciaj film-festivaloj. En *Sitges* troviĝas domo *Bacardi* transformita en muzeon, kie oni povas gustumi la produktojn *Bacardi*. En la jaro 1814a tie naskiĝis *Facundo Bacardí Massó*, kiu en la jaro 1830a migris al Kubo kaj tie estis inventinta la faman



rumon. *Bacardi* estas entrepreno de alkoholaĵoj, kiu ekestis en *Santiago de Cuba* en 1862a. Ĝi estas unu el la plej vendataj alkoholaĵoj en la mondo.

Denove kaj lastfoje ni kun entuziasmo aŭskultis "habaneran" muzikgrupon *Montjüic* dum la jaŭda vespero, kie ne mankis dolĉa ruma trinkaĵo *Cremat*. Vendrede ni adiaŭis per kantado gvidata de Jeanne Draime kaj Martine Demouy.





Finiĝis agrabla 26-a Internacia Semajno, restas nur belaj rememoroj. En Andaluzio ekestos nova Semajno, organizos ĝin spertaj malaganoj.

*Liba Gabalda*

# 26-a

## INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO





**40a BAVELO-Seminario  
84a regiona aŭtuna staĝo  
de la 12a ĝis la 14a de oktobro 2018  
en Heidelberg**

Ĉi-jare la aŭtuna regiona staĝo kaj samtempe la 40a Bavelo-seminario estis organizita de Bavelo iom pli norde, en la ĉarma urbo Heidelberg.

La staĝejo estis la vasta Junulargastejo de Heidelberg, kie kunvenis ankaŭ aliaj grupoj. Al ĝi partoprenis pluraj membroj de nia Orienta Federacio kaj tute aparte la libro-servo, kiun Jean-Luc prizorgas.

En la vespera programo troviĝis la interesa prelego de Karl Breuninger, kiu rakontis pri sia propra vivo post la Dua Mondmilito, kiam lia patro, fizikisto kaj aviad-fakulo, kun la tuta familio devige translokiĝis al Rusio. Tie ili loĝis en aparta vilaĝo, la patro devis labori kiel inĝeniero en la aviad-fako por evoluigi aviadilojn kaj V2-raketojn, kiujn la rusoj ankoraŭ ne regis. Dume li kiel knabo havis malpli streĉan vivon en surlokaj lernejoj, eĉ iam ferianta ĉe nigra maro.

**Per trajno al Heidelberg.**

Kelkaj partoprenantoj deziris iom sperti la favorkostajn germanajn regionajn trajnojn. Eblas akiri tian bileton por 5 personoj, tamen nur en la regionaj trajnoj, pro tio necesas ja pli ofte ŝanĝi je trajno.

Manfred el Frajburgo, iniciatis la veturadon kaj akiris la biletojn.



Aparte interesaj estis la multaj detaloj kaj eĉ fotoj, kiujn li povis montri pri la domo kaj lokoj, kie ili devis restadi.

Por la distra parto de la vespero Christoph Frank prezentis

amuzajn rakontojn per multifaceta libro.

Sabate matene refoje okazis la diversaj kursoj, por komencantoj 1 kaj 2, la paroliga kurso, kaj la "bukedo" kun diversaj prelegoj. Ulrich Brandenburg prelegis pri la malfacila temo "Rusio nia najbaro". Li skizis diversajn politikajn situaciojn en la lastaj jardekoj kaj nuntempe. Tamen estis kuraĝige, ke li tamen restas optimisma pri la estonteco.



Posttagmeze ni ekskursis per busoj ĝis la malnova ponto super la rivero Neckar. Fore eblis vidi la malnovan kastelon. Post transiro de la ponto ni atingis la malnovan urbon. Evidente Heidelberg estas universitata urbo kaj en tiu sabato svarmis multaj homoj kaj ĉefe gejunuloj tra la stratoj. Tie abundis kafejo kaj restoracioj, iuj kun lokaj specialaĵoj.



Estis agrable konstati, ke la aranĝon partoprenis pluraj gejunuloj.

Same per busoj ni revenis al la junulargastejo. Post la vespermanĝo Jean-Luc prezentis al la ĉeestantoj la novajn librojn akiritajn de la Libro-servo. En la sama salono sur pluraj tabloj eblis konsulti kaj eĉ akiri plurajn librojn.

En la vespero revenis la magiisto Christoph Frank por magia kaj fantazia vojaĝo tra la mondo, ĉiam kun novaj surprizoj.




En la pli malfrua vespero funkciis la knajpo en la trinkejo de la junulargastejo.

Dimanĉe matene la prelego temis pri Afriko, nome la Respubliko Kongo kaj Tanzanio.

Manfred prelegis pri helpo al iuj vilaĝoj "Mazingira" en Tanzanio por havigi al ili la trink-akvon. Por tio necesas meti akvo-tubojn de fora torento kaj instali man-pumpilojn.

Alois ankaŭ parolis pri la Respubliko



Kongo, sed pri la nuntempaj konfliktoj kaj eĉ militoj ĉe la landlimo kun Ruando.



**Ni kore dankis al la organizantoj pro tiu agrabla semajnfino en tre interesa urbo kaj memorigis, ke la printempa staĝo okazos en venonta majo en Strasburgo.**

Andreo

Artikolo aperinta en la gazeto L'Alsace la 4an de novembro 2018. Vverkita de Edmond Ludwig sed resumita fare de la redakcio



## Esperantophones à Heidelberg

Un groupe de membres de l'association Mulhouse-Esperanto se sont rendus à Heidelberg récemment pour assister à des conférences données par plusieurs esperantophones allemands lors d'une rencontre d'automne traditionnelle de l'association Badenvirtemberg Esperanto-Ligo, qui collabore étroitement avec Esperanto France-Est.

Dans la splendide auberge de jeunesse de Heidelberg, Ulrich Brandenburg, président de l'association allemande d'esperanto, ancien ambassadeur d'Allemagne à Moscou puis à Lisbonne, a présenté une conférence sur l'ex-URSS et la Russie de Vladimir Putin, présentation passionnante pendant laquelle l'ancien diplomate n'a pas oublié son devoir de réserve. Puis le physicien Karl Breuninger, né après la Seconde Guerre mondiale, a raconté sa jeunesse en Union soviétique où son père, physicien et spécialiste

des fusées V2 durant la période hitlérienne, avait été recruté par Staline pour participer au développement de la force de frappe soviétique.

Loin d'être une langue artificielle, l'esperanto sert à mener des projets concrets, par exemple au service du développement en Afrique : Manfred Westermeyer, chimiste de Freiburg, responsable d'une section Esperanto chez les Verts allemands, et son ami Aloïs Eder (du club d'esperanto de Stuttgart) ont présenté le résultat de leur engagement à Mazingira, en Tanzanie : installation de puits d'eau potable, récupération d'eau de pluie pour le bétail et les jardins, construction d'un bâtiment d'école, collecte de fonds pour opérer des enfants handicapés, plantation d'arbres fruitiers ([www.verduloj.org/mazingira.htm](http://www.verduloj.org/mazingira.htm)). Toutes ces réalisations ont été possibles grâce à la collaboration avec les esperantophones néerlandais Hans et Ans Bakker, les fondations Wasserkraft Volk AG et Stiftung Brücke et avec l'aide financière de particuliers.



Lingvon oni lernas por utiligi ĝin. La utiligo en fakaj terenoj tamen estas pli komplika ol la ĉiutaga konversacio. Ĝi postulas ne nur fakajn partnerojn, organizaĵojn, sed ankaŭ terminarojn kaj fakajn tekstojn.

Se oni volas uzi la lingvon en fakaj aferoj aŭ volas verki, traduki fakajn tekstojn, anticipe oni devas ekkoni la kernajn fakajn terminojn. Ĝuste en tiu tereno volas helpi la projekto de virtuala biblioteko STEB.

<http://www.eventoj.hu/steb>

## Faka Esperanto

Kadre de faka agado oni uzas fakajn esprimojn. Kiel oni elektu siajn esprimojn? Kiel kolekti kaj organizi ilin por kompili terminaron (fakvortaron)? Kiaj programaroj komputilaj povas helpi onin? Terminologio respondas interalie tiajn demandojn.

Terminologio ĉiam ludas gravan rolon, kiam fakaj informoj aŭ scioj estas

- ◇ kreaĵaj (ekz. per esploro)
- ◇ registrataj (ekz. en datumbanko)
- ◇ serĉataj (ekz. per TTT)
- ◇ komunikataj (ekz. inter fakuloj)
- ◇ transdonataj (ekz. per instruado)

Terminologia Esperanto-Centro (TEC) estas informejo kiu respondas la bazajn teoriajn kaj praktikajn demandojn rilate al terminologio en Esperanto.



<http://esperanto.net/tec>



Gesamideanoj,



Vi ja scias, ke laŭ niaj statutoj ni ne rajtas pritrakti ĝeneralan politikon en nia asocio, sed ni rajtas argumenti politike por la defendo kaj promociado de ĉiuj lingvoj, ankaŭ de nia kara Esperanto.

Tion plej efike faras nia fakgrupo EEU (Eŭropa Esperanto-Unio). Kaj en ĝi elstaras, inter aliaj, Zlatko Tišljar el Slovenio.

En 2017 li verkis kaj eldonis 50-paĝan libreton, kiun li nomis *Identecoj*. En ĝi li majstre analizas la aktualan problemon de la identecoj, ene de niaj naciaj ŝtatoj. Li plej trafe donas ekzemplon de kvazaŭa mortigo de lingvo: la irlanda fare de Britio. Kaj li donas solvon al niaj politikistoj por justa lingvopolitiko en EU.

Efika metodo por atingi politikistojn estas la organizo de seminarioj pri EU, en kies programoj ankaŭ estas punkto pri la lingvopolitiko. Tia konferenco estas organizita en Triesto, jam en 2012 kun la partopreno de iamaj ŝtatprezidentoj kaj ministroj. Jam en 2013 aperis la aktoj en Esperanto kaj en la angla. Se vi ne jam malkovris tiujn dokumentojn, mendu ilin ĉe UEA. Tio eble helpos vin por la venontaj EU-balotoj.

Cetere: la duan vi povos eĉ donaci al via nova eŭropa deputito, ... sed nur se li kapablas legi la anglan tradukon!!!

Edmond LUDWIG

*Identecoj*, Zlatko Tišljar, Eseo, Izvori, 2017. Eseo pri la diversaj specoj kaj gradoj de identeco. Prezo: 6.00 EUR.

*Kia estus la nuna Eŭropo sen EU? / How would Europe look today if there were no EU?* Referaj-kolekto de la Eŭropa konferenco, Triesto, 9-a ĝis 11-a de majo 2012. Div, Politiko, EEU, 2013. Prezo: 3 €

E. L.

### Mikaelo BRONŜTEJN venontjare 70-jariĝos!

Nia kara esperantista historiisto, verkisto, poeto kaj komponisto/kantisto Mikaelo BRONŜTEJN ege famkonatas en nia tutmonda movado. Li iĝos 70-jara en 2019.

Okaze de lia naskiĝdatreveno aperos preskaŭ 500-paĝa libro *Blajb gezunt mir, Kroke* (Adiaŭ, Krakovo) kun multaj unikaj fotoj pri la juda vivo. Ĝi entenos preskaŭ 50 kantojn (jide kaj esperante + muziknotoj) de la juda bardo, krakovano, Mordeĥaj Gebirtig, kiu pereis en 1942 en la Krakova getto. Tradukis ilin majstre Miŝa.


Ni planas aldoni al la libro 2 KD-ojn kun la kantoj el la libro. Kantos Miŝa kun akompano de gelernantoj el la muziklernejo en Tiĥvin.

Vi povas fariĝi sponsoro de la registrotaj KD-oj. Per la ĝiro de 15€ por unu kanto (aŭ pli, laŭ via emo) al la UEA-konto de Tomasz CHMIELIK tchm-j.

Se vi tion deziras, via nomo kiel sponsoro aperos en la verko. Ĉiu kontribuonto ricevos donace la libron kun ambaŭ KD-oj.



Tomasz CHMIELIK

<b>Espéranto France-Est</b>		<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction: Redaktoro:</b>	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	Nova 09.71.31.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	09.86.38.78.61	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj  <i>Assesseeurs</i>	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Ginette MARTIN		forpasis la 3an de decembro 2018
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Yves STUTZ	03.89.39.83.14	stutzzyves@gmail.com
S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammbach@gmail.com	

<b>Abono al La Informilo →</b>	18 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <b>Paiement par chèque au nom de</b>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <b>Paiement par virement au compte</b>
Per internacia ĝiro →	IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier	

1. Vikipedio	15. Staĝo en Strasburgo	<p><b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b>  <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b>  bulletin d'information bilingue sur l'espéranto  édité par l'association culturelle  <b>Esperanto France-Est</b>  MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République  <b>54000 NANCY</b>  Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b>  Rédacteur provisoire : André Grossmann  Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b>  Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>
2. Semajno en Salou	16. Enigmoj kaj humoraĵoj	
3. Semajno en Salou	17. Abonoj kaj kotizoj	
4. Semajno en Salou	18. Robert Colin	
5. Semajno en Salou	19. Ginette Martin	
6. Staĝo en Heidelberg	20. Ginette Martin	
7. Staĝo en Heidelberg	21. Libro-servo	
8. Staĝo en Heidelberg	22. Zamenhof-festo Frajburgo	
9. Angulo de la prezidanto	23. Implesoj pri Vieno	
10. Komitatanoj kaj enhavo	24. Implesoj pri Vieno	
11. Avula Angulo	25. Théophile Cart	
12. Heliantoj	26. Théophile + Fame Premio	
13. Poezio + Harplektaĵo	27. Renovigo de E° en Burundo	
14. Staĝo en Strasburgo	28. Nia foto-paĝo	



*Dum koŝmarigis la mondmilito, nia regiono (Alzaco kaj departemento Moselle) estis aneksita al la nazia "Reich" ĝis sia Liberigado en 1944-45.*

*Perforto gvatis ĉiun unuopulon, sed ...maltrafis kelkfoje.*

*En 1940, alvenis "kolonianoj" el Sarlando en mian vilaĝon. (sekvo)*

## SPITGESTO

Inter la "siedleroj" -Saarland-kolonianoj-manifestiĝis S-ro Forst, kiel partiano, sed diskreta homo. Li salutis avare kaj evitis kontaktojn kun Lorenanoj. Ŝajne lia privilegia situo malkomfortigis lin.

Tamen li streĉe baraktis por "la finvenko" de la germana armeo: la familio akceptis milite venditajn soldatojn cele de ilia restarigo. Li energie utilis serbajn milit-kaptitojn en sia farmo kaj ukrain-devenan servistinon, Marijka.

Marijka, ŝia frato kaj aliaj junaj Ukrainoj estis sub deviga laboro, samkiel militkaptitoj. La okupanto rabis ilin en ilia lando kaj nuligis tiel ilian deziron aliĝi al Rezistado.

Marijka estis deksex, beleta kaj iel ribelema. Ŝi flegis intencon kontraŭstari multon en tiu rigid-skola socio, kiu marŝis laŭ "anseropaŝo".

Ŝi tuj apartigis la invadintan "lolon disde la tritiko". La plej aĝajn Lorenanojn ŝi salutis per diskreta rideto; la "siedlerojn", sen rideto. Grrr! Sed en sia laboro, ŝi iĝis malhavebla: la gesinjoroj Forst estimegis la fraŭlinon.

Marijka ankaŭ respondis al la salutoj de la vilaĝaj junuloj, kiuj ŝin atentadis. Ŝi montris preferon al samaĝula Bernard loĝanta en ŝia najbareco. Knaboj gvatis la interŝanĝojn de teneraj signoj, kiam la junulino gvidis sian bovinan gregon al la fontano. Bernard ŝin atendis kaŝe.

Ege malpermesataj estis tiaj manovroj!

Ni, adoleskantoj, sekvis la aventuron kun ekstrema scivolemo: temis ja pri seksumado (tabua) kaj pri prohibitaĵo (punebla). La gepatroj de la bubo koleregis; la vilaĝanoj timis senkompatan fulmotondron; la "siedleraro" kondamnis la spitgeston de la gejunuloj.

S-ro Forst vizitis la gepatrojn de Bernard, sen kriaĉo, sed postuleme: "Ni estas en milito. Estas limoj netransireblaj inter Germanoj kaj submetitoj.". Siaflanke, la Ukrainineto akceptis la

lecionon, obeema, kaj ridetanta.

Ĉiuflanke oni baraktis malhelpi tiujn elanojn. Milito ja baraktas pied-ligi ĉian amsenton! Sed la du amantoj sciis organizi siajn rendevuojn. Marijka akceptis gravedecon kun indulgoveka rideto.

Gesinjoroj Forst, ŝiaj mastroj, akceptis ne malhelpi la okazaĵon, tiel kontraŭstarante oficialan sintenon.

Bernard, la "kulpulo", estis forigita; kaptis lin la armeo. (Li travivis save la okazaĵon.) Marijka, fremdulino kaj proskribita, gajnis sian vivospacon en la socio per firma kaj humila kontraŭstaro.

## KONTRAŬVERKANTA REKLAMADO

*Naziuloj flegis streĉe propagandi pri siaj militaj sukcesoj.*

*Ofte kontraŭverkante siajn celojn.*

*1943. Je iu printempa mateno. Alarmo!*

Usonaj "aviad-fortresoj" (1) tondris en la aero. Ilia insiste ega zumado vibrigis la atmosferon.

En ĉiela alteco, de tempo al tempo, brilis kelkaj aviadilaj fuzelaĵoj revenante el Germanio. Post detruiga misio la enloĝantoj forlasis siajn domojn por vivsperti tian timigan spektaklon. Mi staris en nia ĝardeno, tetanizita.

Subite, -kio do? -bruaĉo de mitralado! Jen, nekredblaĵo!

Tia usona "aviad-fortreso" alflugis el la nordo, malalte super la horizonto. Mort-trafita de germana ĉas-aviadilo, ĝi forlasis la svarmon de kunula atak-teamo.

Perdante pli kaj pli da alteco, la "fortreso" kraŝis en kampo de najbara vilaĝo.

Fiere montris la germana armeo la aviadil-ŝelon sen ĝiaj aloj. Ĝia impona transportado haltis ĉe preĝejo cele de propagando: Nu! Ni ankoraŭ venkis! Venu, kaj bontaksu la sukceson!

Mi vizitis la restaĵon: ĝi estis monstra. En la vakuon, kiom da bomboj oni povis stapli?

Streĉa malbonsento!

Dekoj da tiuj maŝinegoj okupis la ĉielon antaŭ kelkaj tagoj. Pro tio, la triumfaj akcentoj de la komentanto sonis ege falsaj: evidentiĝis la milita fortego de la Aliancoj super la "Reich".

(1) Terura, grandega bombaviadilo

## Heliantoj

- En iu jaro, abundis la blankaj floroj, do, la tuta urbo aspektis kiel grandega fianĉina florbukedo.  
 -La postan jaron, abundis la ruĝaj floroj.  
 -Tiam, multaj gejunuloj enamiĝis, kaj geedziĝis.  
 -Kaj estis ankaŭ flavaj jaroj kaj bluaj jaroj.  
 -Sed la plej interesa estis la bunta jaro, kiam ĉiukoloraj floroj beligis la urbon.  
 -Ĉiuj amis, kaj estimis la ĝardeniston, kaj la urbanoj estis ege dankemaj al li.  
 -Bedaŭrinde, dum tiu bunta jaro, kiam eble plej bela estis la urbo, traveturis ĝin malamikaj fremduloj.  
 -Kiel vandaloj ili neniigis ĉion.  
 -Eĉ unu floro ne restis surstrate.  
 -La flormalamantoj detruis ne nur la florojn.  
 -Kiel uragano, ili neniigis ĉion, kion ili trovis survoje.  
 -Neimageble aspektis la urbo.  
 Dum unu tago, ili sukcesis detruĝi ĉion atingeblan.  
 -Subite ili aperis, subite ili malaperis.  
 -La maljuniĝinta ĝardenisto, vidante la katastrofon, malsaniĝis, kaj, post nelonge, li mortis.  
 -Lia filino, kiu, antaŭe, helpis sian patron, ne volis daŭrigi tiun laboron.  
 -Ankaŭ ŝi suferis, jam ankaŭ pro la morto de la patro.  
 -Ekde tiam, la urbo estas senflora.  
 -Neniu kuraĝas rekomenci la laboron de la iama ĝardenisto.  
 -La juna nepino, aŭskultante la rakonton de sia Avo, ege tristiĝis. Ĉe la fino ŝi eĉ ekploris  
 -Ankaŭ la Avo malgajiĝis vidante la plorantan dolĉan nepinon.  
 -Sed, subite, la knabino ekridetis.  
 -Avo! Helpu min! Mi volas reflorigi vian urbon!  
 -Kiel? Kion vi volas fari?  
 -Venontjare, frutempe, mi denove vizitos vin!  
 -Mi alportos florsemojn.  
 -Ĝis vespere la juna knabino kaj la maljuna Avo diskutadis pri ĉio, kaj ili decidis..  
 -Nur vespere aŭ frumatene ili semos, ke neniu rimarku ilian laboron.  
 -Pasis la tempo.  
 -La senflora urbo denove iĝis belege florplena!  
 -La unuan jaron, kiam la du floramantoj sekrete plantis la semojn, kaj subite ĉie aperis diversaj belaj floroj, la homoj miregante haltis.  
 -Miraklo! Miraklo okazis! La ĝardenisto sendis al ni florsemojn!  
 -Kaj ili ege ĝojis zorgis pri la floroj, ili akvumis kaj forigis la sovaĝajn florojn.  
 -La nepino estis tre feliĉa.  
 -Sekvis la dua jaro.  
 -Tiam la urbanoj alprenis gravan decidon.  
 -Ili mem semos, kaj akvumos!.

-Ili ne plu volas vivi en senflora urbo!.

-Kaj la decido ne restis nur plano, ĝi vere efektiviĝis!.

Neniam oni eksciis, ke tiu juna knabino kaŭzis la ŝanĝon de la trista urbo, vekante ties loĝantojn el ilia indiferenteco.

- La urbo denove famiĝis pro siaj belegaj floroj.

-En la centro, inter la aleoj, oni starigis statuon de la maljuna ĝardenisto, ĉar ĉiuj estis konvinkitaj, ke lin oni devas danki pro la reaperintaj floroj.

-La knabeto kun humidaj okuloj alrigardis sian patronon.

-“Panjo, diru la veron, ĉu vi estis tiu nepineto, kiu reflorigis la urbon de la geavoj?”.

-Post longa silento, la patrino flustre respondis: “Jes, estis mi”

-“Dolĉa Panjo! Ankaŭ mi volas esti, kiel vi”!

-Poste, ĉirkaŭis la kolon de la patrino la du maldikaj brakoj de la knabeto.

-Neniam li volus forlasi ŝin.

-“Bone, bone! Sed nun dormu bele! Ĉiuj geknaboj dormas je ĉi tiu horo”.

-La patrino kisis sian fileton, sed li ne povis endormiĝi.

-Fakte, li tre similis al sia patrino, ja ĉiam li pensis, kiel ĝojigi aliulojn.

-Sekvontmatene, post la matenmanĝo, li tre serioze rigardis al sia patrino.

-“Panjo! Mi pensadis pri via belega rakonto! Mi estas tre fiera, ke vi estas mia patrino.

-Mi havas ideon, kaj mi volas scii vian opinion!.

-Diru al mi, ĉu vi semis ĉiujn semojn de la helianto?

-“Ne, karulo, mi havas ankoraŭ manplenen da ili”.

-“Panjo! Mi scias, ke nia urbo ne estas senflora, tamen, ankaŭ mi povas fari surprizon.

-Ĉu vi rimarkis, ke apud la benzinputoj, ne estas floroj?.

-Mi volas sekrete semi apud tiuj lokoj sunflorsemojn!.

-Ĉu vi donas al mi tiujn, kiujn vi ne semos?”.

-La patrino feliĉa transdonis la semojn.

-Kaj la knabeto, same kiel iam lia patrino, sekrete semis, kaj semis.

-Somersfine, plurloke en la urbo, sed aparte apud benzinstacioj, kreskis altegaj belegaj heliantoj.

-Neniu sciis, de kie ili aperis.

-La knabeto, kiel lia patrino, volis simple donaci, ne atendante dankemon.

-Eble ne ekzistas pli granda ĝojo por la homo.



## Poezio

Jen Feliĉa el Koreio proponas novan poemon, kvazaŭ inviton al mistera mondo.

Ami kaj Amo

Ni ĝuu ŝian teneran romantikecon



*Nia ĝojo, kiam ni amas unu la alian,  
estas la parto de tiu mara glaci-monto,  
ja super la surfaco de la maro,  
videbla.*

*Nia malĝojo, kiam ni disiĝas unu de la alia,  
estas la parto de tiu mara glaci-monto,  
ja sub la surfaco de la maro,  
nevidebla.*

*Mi ankoraŭ ne havas kuraĝon malkovri  
kiom granda estas tiu parto sub maro.*

### Harplektaĵo en Alzaco kaj ankaŭ en.. Suda Koreio.

Al mia korea korespondantino Feliĉa (*Namhaeng Lee*), kies poemoj jam aperis en La Informilo 183 kaj ankaŭ ĉi-supre, mi sendis ekzempleron de nia eldonaĵo "Harplektaĵo" de la alzaca poetino/verkistino Sylvie Reff kaj tradukita de Edmond Ludwig.

Jen sube kion ŝi skribis. Eble iam iu esperantista teatra trupo deziros prezenti la verkon. **Andreo**

*La harplektaĵo estas kortuŝita al mi. Leginte tiun ĉi skribaĵon mi pensis mian bopatrino, kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj, kiam ŝi estis 101-jara. Post sia edziniĝo ŝi neniam tranĉis sian hararon. Kelkajn jarojn antaŭ sia morto, ŝi vivis en komuna loĝejo por malfortaj maljunuloj, laŭ la regulo ŝia hararo estis tranĉita. Ŝi donis al mi grandan amon kaj mi ĉiam dankas ŝin, kaj respektas ŝian grandanimon al niaj familianoj.*

*Ankaŭ mi verkis serie kaj fabele pri amo.*

*Feliĉa*

Ami estas...

*Ami estas tuŝi per mano  
kaj brakumi por senti tremon de koro.*

*Juneco ne estas ago de junuloj,  
sed sento de juna koro tremanta emocie.*

*Mi sentas tremon de mia koro  
kaj samtempe tremon de via koro,  
mia kara!*

Amo.

*Ja amo estas plezuro,  
sed mistero.*

*La tempo esti kun la amato  
ne estas kalkulebla per horloĝoj  
kaj la spaco esti kun la amato  
ne estas indikebla per mapo de terglobo.*

*La tempo kaj la spaco  
kiun ni dividas unu kun la alia  
ne ekzistas en tiu reala mondo.*

*Amo guidas nin  
al mistera mondo  
kie ni trovas tiun tempon  
kaj tiun spacon nur por ni.*

*Ĉu ni iru al tiu mondo.*



Libreto daŭre akireblas ĉe nia kasisto je:  
1,50 + 1,70 = 3,20 eŭroj

# Printempa Esperanto Renkontiĝo en Strasburgo

10<sup>a</sup>-12<sup>a</sup> de  
majo 2019



85<sup>a</sup> regiona staĝo de Esperanto en Rejna valo

Kulturcentro Saint-Thomas, meze de la eŭropa kvartalo

Bunta programo, kleriga kaj distra por ĉiu intereso !

Kun la subteno de :

**esperanto**  
France-Est

Organizata de :

**esperanto**  
Strasbourg

Bunta programo

Agrabla loko

Kaj La organiza teamo preparis diversan kaj allogan programon, i.a. :

- kursoj por komencantoj (kun Jeff Schelcher) kaj progresantoj (kun Fabien Tschudy),
- tablo ludoj kaj eksteraj ludoj,
- ekskursoj en diversaj kvartaloj de la urbo, tage kaj nokte, piede/trame aŭ bicikle,
- kant-ateliero kaj koncerteto ekstere,
- koncertoj de Jonny M kaj prezento de "La Kanto Ĝenerala"
- prelego de István Ertl,
- literatura angulo kun Bernard Behra kaj István . . . kaj aliaj surprizoj!

Ankaŭ vi povas kontribui, per peĉakuĉo, prezentaĵo el 20 lumbildoj. Ĉiun vi montros dum 20 sekundoj.

Kaj kiel kutime vizitu la buntan libroservon!



La loko elektita estas renkontiĝejo por grupoj kaj asocioj diversaj. Ĝi situas avantaĝe 300m for de tramhaltejo kaj de la Eŭropaj instancoj (parlamentejo, konsilio, palaco de homrajtoj, kuracilagentejo,...).

La Centro lokiĝas en agrabla parko de trankvila kvartalo de la Robertsau kun fermita parkejo.

La ĉambroj estas komfortaj (ĉiuj kun necesejo, duŝejo, lito- kaj tualetotukoj provizataj) renovigitaj kaj la kunven-salonoj sufiĉe larĝaj por enteni kongreson. Ni ankaŭ povos ĝui la lokan kuirado en la Centro mem.

**Aliĝilo al Printempa Esperanto-Renkontiĝo en Strasburgo**

Familia nomo	Persona nomo	Naskiĝ-jaro	Kotizoj			Ekskursoj				
			1	2	3	A	B	C	D	E

Adreso.....  
 .....  
 .....

Poŝtelefono .....  
 Re-adreso .....

**Ekskursoj** (tram + vizitbiletoj inkluzive) x nombro :

- A) Nokta vizito de la urbocentro vendrede (21h30-23h30) : 5 €
- B) Vizito de la hospitala vinkelo sabate (9h30-11h30) : 5 €
- C) Vizito de la urbocentro sabate (15h30-17h30) : 5 €
- D) Bicikla vizito de la eko-kvartalo dimanĉe (9h30-11h) : 5 €
- E) Perŝipa vizito de la urbo « Strasburgo 20 jarcentoj da historio » dimanĉe (14h00-15h15) : 15 €

**KOTIZOJ SUME : ..... €**

Mi elektas : (indiku nombron)	Ven 10	Sab 11	Dim 12
Tagmanĝo x 16€			
Vespermanĝo x 13€			
Tranoktado simpla ĉambro x 42€			
Tranoktado 2 pers. ĉambro x 33€ / pers.			
Tranoktado 3 pers. ĉambro x 33€ / pers.			

**Tranoktado** inkluzivas matenmanĝo. Ĉambro kun necesejo, duŝejo, lito-tukoj kaj tualet-tukoj

- Mi preferas manĝi vegetare
- Mi deziras tranokti kun .....

**RESTADO SUME:.....€**

Mi aliĝas al la Printempa Esperanto Renkontiĝo 2019 en Strasburgo

Mi pagas kotizon, ekskursojn kaj restadon

entute: . .....€

plus donaco por la kongresa kaso .....€..

**ENTUTE** .....€

(donacanto ricevos ateston por franca imposto)



je la (dato) : ..... Subskribo :

per monĝiro al konto de Espéranto Strasbourg  
 IBAN: FR76 1027 8010 8100 0206 7800 168

BIC: CMCIFR2A

aŭ  per ĉeko nome de Espéranto Strasbourg

Mi pretas proponi tiun **fulmprezenton** :.....  
 .....

La aliĝilon kaj pagon sendu :

- rete al [printempo2019@esperanto-strasbourg.net](mailto:printempo2019@esperanto-strasbourg.net)
- aŭ papere al Marie-Claude BOREGGIO  
 19 rue du Bilstein  
 67100 STRASBOURG

Pliaj informoj kaj aktualigita programo ĉe  
[www.esperanto-strasbourg.net](http://www.esperanto-strasbourg.net)

**Kotizoj**

La kotizo entenas la partoprenon al la kurso, prelegoj kaj distra programo.

	Baza kotizo	Rabata kotizo
Ĝis 31-01-2019	30 €	20 €
Ĝis 31-03-2019	40 €	25 €
Post 31-03-2019	50 €	30 €

La rabata kotizo estas por sam-adresulo/handikapito/ sensalajrulo/ studento.

**Infano** naskita inter 01.01.2005 kaj .31.12.2014: 5 €

## Ni lernu per enigmoj kaj humoraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2									
3									
4									
5									
6									
7									
8									
9									

JG

Edzo: *“Plurfoje mi deziris alvoki vin de mia oficejo, sed vane, ĉiufoje estis okupita... nekredeble.”*

Edzino: *“Tio ne mirigas min! Mi ja estis telefonanta al mia amikino Eva, kiu vere estas unika virino.*

*Ŝi kapablas aŭskulti min dum horoj ĉe la telefono!”*

En kafejo, viro, membro de asocio kontraŭ alkoholismo babilas kun drinkemulo. Li provas persvadi ĉesigi drinkaĉi kaj ebriiĝi. Tamen vane li klopodas, la ebrulo tute ne deziras rezigni pri sia drinkemo.

Tiam la viro argumentas: *“Eksciu, ke en Francio mortas ĉiujare pli ol cent-mil francoj pro alkoholismo:”*

La ebrulo provas respondi: *“Ĉu! ĉu! Tio ne koncernas min, mi ja estas belgo!”*

Edzino enirante sian kuirejon ekvidas sian edzon okupita por forpeli muŝojn per muŝbatilo.

*“Ĉu vi jam sukcesis mortigi kelkajn?”*

*- Jes, du masklojn kaj kvin femalojn!*

*- Mirige! Kiel vi kapablas rimarki la seks-diferencon de tiuj etaj insektoj?*

*- Facile, du estis sur mia bier-glaso kaj kvin sur la telefono!”*

Iom malsvelta sinjorino eniras apotekon por aĉeti specifajn kremojn kaj pilolojn kun la deziro aspekti pli alloga okaze ferio-tempo...

Dum deĵorantino preparas la pakaĵon, la scivolema klientino flustre demandas al ŝi en la orelo:

*“Fraŭlino, diru al mi... kiom mi povas perdi uzante ĉion-ĉi?”*

La juna deĵorantino finpretigas la fakturon, iom okulumas al la apuda apotikisto kaj mallaŭte flustras:

*“Iom pli ol 200 eŭrojn...”*

Iu patrino deziras aĉeti novan robon en mod-butiko. En la eta provejo-budo ŝi surmetas diversajn modelojn.. Ŝia eta kvar-jara filino akompanas ŝin kaj plurfoje

### HORIZONTALE

- Unuĉevala veturil’.
- Subtera malliberej’.
- Kordinstrument’ . Rodana urb’.
- Deglitej’.
- Demanda adjektivo.
- Malpliigi. Nun sen koro.
- Inverse*: submetiĝi. Provok’.
- Inverse*: animal’ . Seniproĉe justa.
- Hispana urb’ . *Inverse*: ne pli ol.

### VERTIKALE

- Kampanan’
- Arbo. Spirebla gaso.
- Moŝtul’ de Charles Perrault.
- Ceremonio. Pronomo.
- Adverbo. Komika efekt’ . Nuda sen vokaloj.
- Inverse*: vertikala dimensi’ . Filo.
- Kolora likv’ . Komenco de ebriceo.
- Komenco. Efik’ al iu aŭ io.
- Loĝant’ de E-Afrika lando.

komplimentas:

*“Vere panjo, vi estas tre bela...!”*

En apuda budo aŭdiĝas la voĉo de klientino, kiu petas:

*“Sinjorino, ĉu vi bonvolus pruntedoni al mi vian etulinon dum iom da tempo?...”*

La eta Roberto revenas hejmen plorante:

Paĉjo demandas lin: *“Kio okazis?”*

*- Mi ricevis nulon pro geografia misrespondo... mi ne sciis, kie kuŝas Slovenio...*

*- Nekredeble... alportu al mi mapon de Francio, tiam mi povos montri al vi...”*

La patro okulumas, serĉadas..

*“Nu, ŝajne tiu mapo ne estas sufiĉe preciza.. alportu tiun de la regiono...”*

Sed daŭre li malsukcesas por trovi Slovenion kaj grumblante li diras:

*“Mi tamen certas, ke Slovenio troviĝas tute proksime!”*

*Mi havas slovenan amikon, kiu ĉiumatene venas bicikle al la uzino!”*

### Solve de la KVE de La Informilo 183

**HORIZONTALE:** 1.DULINGVISM. 2.ENEN. UESTO. 3. KURTEN. LAD. 4.DATEN. TALI. 5.ALTERN. 6.LA. ER. EDNI. 7.AMIKIN. AJ. 8. TAKT. ORNAT. 9.ERO. IRE. RR. 10.RANDUMANTA.

**VERTIKALE:** 1.DEKDULATER. 2.UNUA. AMARA. 3. LERTA. IKON. 4.INTELEKT. 5.ENTRI. IU. 6.GUN. NORM. 7.VE. TRE. REA. 8.ISLANDAN. 9.STAL. NJART. 10.MODIFI. TRA.



## ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2019 ĝis 2021

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta  $20 - 66\% = 6,80$  eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2018 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2019.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Komence de 2019 altiĝas la poŝtaj tarifoj en Francio. Tial ekde 2019 la abono al la Informilo iom altiĝis al 18 eŭroj.

Ni proponas al vi kiel eble plej frue pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2019	2020	2021
		Abono por la papera versio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
<b>UEA 2019</b>	MB	• Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro)			44 eŭroj
	MA	• Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon <b>Esperanto papere</b>			74 eŭroj
Pag- manieroj	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2019 por 1208				
	<b>2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2019, 2020				
	<b>3. Per internacia aŭ reta ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn:</b> IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)				

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

### "De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala.

12 + 3,40 = 15,40 eŭroj

### **Momerige al Roger Imbert (1938—2009)**

Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (<kroatio)

4+1,70=5,70 eŭroj

### **Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)**

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig

1,50 + 1,70 = 3,20 eŭroj

**Knabaj petolaĵoj** Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig

1,50 + 1,70 = 3,20 eŭroj

**La harplektaĵo de Sylvie Reff** Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig

1,50 + 1,70 = 3,20 eŭroj

### **Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo**

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio an-

kaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo

12 + 7 = 19 eŭroj

**Poŝamiko** Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn,

tekstetojn, kelkajn ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn.

5,30 + 1,70 = 7 eŭroj

## Forpasis nia samideano Robert COLIN

En mardo la 24a de aŭgusto 2018



Ĝi estis nia lernejo, tiu nia, kiun ni ankoraŭ povus hodiaŭ doni kiel ekzemplon al la aliaj homoj por lerni malkovron de la vivo..

Ni, iamaj lernantoj de la lernejo de la vilaĝeto Bouvacôte, hodiaŭ kolektiĝas ĉirkaŭ nia kara instruisto Robert Colin por fari al li lastan omaĝon, sed ne por sendi al li niajn lastajn pensojn ĉar, neniu tago pasos, en kiu li ne akompanos nin tra la transdonitaj valoroj

Kiam en 1954 li alvenis al nia lernejo, ekestis duboj koncerne la devojn pri instruado en la kunteksto de la momento, do li elektis la metodon de Celestin FREINET, kiu estis lia Majstro.

Tiu Metodo aspektis tre revolucia laŭ ies opinioj, kaj tamen nia lernejo iĝis eksperimenta kaj bonvenigis multajn estontajn instruistojn, kiuj deziris inspiriĝi el ĝi.

Kun fidemo naskiĝis elano de espero kaj entuziasmo inter la instruisto, la lernantoj kaj ties gepatroj. Ekestis neforgeseblaj jaroj por ĉiuj feliĉantaj kunsperiti la lernejan vivon. Sen forgeso de la baza eduko, eĉ se ĝi estis disdonata malpli tradicie ol aliloke, ni estis enkondukitaj al multaj aliaj agadoj: muziko, kantado, desegno, pentrado, ceramiko, brulgravurado, kaj presado de nia malgranda ĵurnalo "Erik-peceto", kiu surprizis multajn en tiu tempo.

Sinjoro Colin tiam proponis fondi amikan asembleon de gepatroj kaj amikan movadon de junuloj, kiu donis al ĉiuj la eblon praktiki siajn talentojn, daŭrigante la ĉeestadon en ĉi-tiu mirinda lernejo, kun la sama spirito de interŝanĝo, sindonemo, kreado, esprimo; eĉ festo-salono estis konstruita apude fare de ĉiuj volontuloj de la vilaĝeto.

Estis tiam kunveno kun la junularo de Osmery el la regiono Berry, interŝanĝo riĉa je malkovro kaj amikeco.

Kinaj seancoj, administrataj de la lerneja kooperativo kaj de ekslernantoj, aldonis pluson al la amikaj kulturaj interŝanĝoj; dum la familioj ĝuis renkontojn sabate vespere. Teatraj agadoj, plia daŭrigo de la festoj organizataj kun la lernejo, daŭre vivis tra la junulara klubo laŭ iniciato de sinjoro Colin helpata de lia edzino; krome, tiu trupo estas ĉe la origino de la teatra grupo ATA, kiu ankoraŭ nuntempe ekzistas en Le Tholy. Dum

kelkaj jaroj sinjoro Colin estis la ensceniganto.

Forlasi lernejon je la 16a30? Pri tio ni malofte pensis, ĉiam ekzistis bona kialo resti kune

*Tiam, okazis la instruado de Esperanto, lingvo sen baroj, kiun la pli aĝaj lernantoj de la klaso lernis kun nekredbla diligenco, stimulitaj per allogo al korespondado kun multaj fremdaj landoj. Tiel okazis la unua vojaĝo por malkovri Germanujon.*

*Aliaj korespondadoj estis komencitaj en Francujo kun vojaĝ-interŝanĝo en la departemento Aube kun Villeneuve-aux-Chemin, kaj ni havas la honoron havi kun ni Dan, la instruiston de tiu tempo, dankon Dan, pro ĉiuj-ĉi rememoroj kaj via varma hodiaŭa ĉeesto.*

*Fakte, dum ĉi-tiu periodo, neniam lernantoj vere forlasis lernejon kaj ĉiuj restis fidelaj al ĝi. Gepatroj kaj amikoj pli kaj pli interesiĝis kaj partoprenis diversajn agadojn.*

sub la superrigardo de nia instruisto por fari desegnojn, aŭ skribi leterojn por niaj korespondantoj, provi niajn skizojn de Teatro, aŭskulti muzikon, aŭ purigi kaj ordigi la presmaterialon. Ni revenis hejmen feliĉaj pri nia tago kaj ni revenis al la klaso la sekvan tagon, kun libera spirito, kaj ĉiam fervoraj por nova scio.

Ni volis, ke nia lernejo estu bela, alloga, kaj dum niaj paŭzoj, kie hobiaj ne mankis, ni ankaŭ rezervis lokon por ĝardenumado, kaj rigardis atente la kreskadon de floroj, kiuj ja plifortigis nian bonfarton en jam privilegia medio.

Kiaj belaj jaroj kaj kia bela eduko estis proponitaj, kiuj forte restis laŭlonge de nia vivo. Ni havis la feliĉon esprimi nian dankemon dum emociiga rekontiĝo de ĉiuj en 2004, ĉar ni certis, ke tiu lia tempo donita al la lernejo estis ebla nur dank'al la komprenemo de lia edzino kaj liaj gefiloj.

Ni ne forgesos lian dediĉon kiel sekretario en nia urbodomo de Bouvacôte, kiu tiam dependis de la urbo Vagney, li faris pli multe ol la administrajn taskojn, kaj en spirito de reciproka helpo kaj solidareco, ni eĉ diros amikeco. Lia publika servo ne ĉesis tie, ĉar li funkciis poste kiel urbokonsilanto en Le Tholy.

Teksto skribita kaj legita de Christiane Tisserant, marde la 24an de julio 2018 dum kolektiĝis kvardek iamaj lernantoj ĉirkaŭ la ĉerko, formantaj rondon de amikeco.  
tradukita de Ginette Martin.

Kiel simbolo de ĉi-tiu periodo pasigita en Bouvacôte, la paro dezirintis konstrui belan domon ne malproksime de la lernejo por reveni pasigi pacan emeritiĝon, ili vivis tie ĝis ĉi-tiuj lastaj monatoj.

Kara instruisto, via vivo finiĝas ĉi-tie hodiaŭ, sed ni scias, same kiel ĉiuj viaj proksimuloj, via edzino Marguerite, Claudette kaj Maurice, Anthony, Elodie, Lucie kaj Anna, pri kiuj ni tre forte pensas hodiaŭ, ke ĝi estis tute plena vivo, turnita al aliuloj, ni eĉ diros dediĉitaj al aliuloj, kaj pro ĉio-ĉi, "Granda Majstro", grandegan dankon!

En lernejo kiel la nia,  
ni ŝatus vidi flori  
ĉiujn aliajn infanojn  
kun la kapo plena de feliĉaj memoroj.

*Ankaŭ mi havas grandan ŝuldon al Robert Colin, kiu instruis Esperanton dum 11 jaroj en la kulturdomo de Gérardmer. Mi havis la bonŝancon ĉeesti liajn kursojn kun plezuro dum 6 jaroj.*

*Kaj Esperanto ne estis komplete utopio, ĉar morgaŭ mi iras al Kongreso de Esperanto en Lisbono, kie ĉeestos 1300 personoj el sesdeko da landoj.*

*Kara Robert, vi malfermis multajn horizontojn en mia vivo kaj dankon pro ĉio !*

*Ginette MARTIN, por la esperanto-grupo de Gérardmer*



**Ni neniam forgesos Ginette.  
Ni estas ege malĝojaj ke ŝi mortis.**

**Amike**

Okaze de la forpaso de nia samideanino Ginette, nia asocio ricevis multajn amikajn kaj simpatiajn kondolencajn mesaĝojn de samideanoj el Loreno, el Alzaco sed ankaŭ el Bavelo en Germanio el Finnlando de ŝia amikino.

## Forpasis nia samideanino Ginette Martin

la 3an de decembro 2018



“*Mi klopodos ricevi mian komputilon en la hospitalo*” diris Ginette telefone kaj kelkajn tagojn poste ŝi jam mesaĝis:

“*Mi ĵus revenis hejmen, sed mi estas tre malforta. En la hospitalo, mi ne rajtis uzi wi-fi-n, do mia komputilo utilis nur por rigardi fotojn kaj fari strategiajn ludojn. En la hejmo, mi ricevos helpon por purigado, ricevo de faritaj manĝaĵoj. Mi esperas daŭre vivi ĝis mia operacio, kiu okazos devige en Nancio en ne planita dato. Mi okupas min en esperantaj taskoj, kiuj forgesigas al mi miajn problemojn. Amike salutas Ginette*”.

Bedaŭrinde jam iujn tagojn poste nin atingis alvoko de ŝia amikino Simone Cajelot pri ŝia forpaso.

La entombiga ceremonio okazis en ŝia loĝloko, Saulxures-sur-Moselotte, kie adiaŭis multnombra loĝantaro. Ĉar Ginette ne nur aktivis en la Esperanto-movado, sed ankaŭ en diversaj lokaj asocioj, legis mesaĝojn anoj de tiuj asocioj, ŝia baptofilino kaj ankaŭ ni esperantistoj. Ĉeestis samideanoj el Loreno, el Alzaco kaj alveturis eĉ du gesamideanoj el Germanio. Ŝia kunlaboro kun BAVELO ja estis daŭra.

La entombigo okazis en la familia tombo en la apuda urbeto Cornimont.

Dume atingis nin mesaĝoj el pluraj landoj. Pola Retradio omaĝis al sia longtempa aŭskultantino ekde la posta tago.

Mankos al ni ne nur senlaca aktivulino, sed ankaŭ kara amikino.

Edmond LUDWIG

**Ginette (Geneviève) Martin (1938-2018)**, eksa instruistino, ege aktivis en la Esperanto-movado sine de orientfranca Esperanto-Federacio (Espéranto France-Est). Ŝi kreis grupon en Gérardmer (88), kien ŝi invitis plurfoje prelegantojn el diversaj landoj. Ŝi ankaŭ instruis Esperanton en diversaj lernejoj. Ĉiun duan jaron ŝi organizis la “amikan tagon” ie en la Vojeza Montaro. Ĝi arigis samideanojn el la germana Badenvirtembergo kaj orienta Francio. Ĝis 2018 ŝi partoprenis en diversaj kongresoj kaj kunvenoj, enlande kaj eksterlande, laste en Lisbono. Daŭre ŝi raportis pri tiuj kunvenoj en la regiona bulteno LA INFORMILO. Ekde sia esperantistiĝo ŝi restis fidela aŭskultantino de Pola Radio, poste de Pola Retradio.

La esperantlingvan literaturon ŝi konigis al siaj samlandanoj per kreo de laborskipoj, kiuj tradukis la rakonton de Spomenka Ŝtimec *Kroata Milita Noktlibro (Journal de nuit - Témoignage de femme dans la Croatie en guerre)* kaj la romanon de la aŭstralia verkisto Trevor Steel, *Flugi kun kakatuoj (Comme un vol d'oiseau sacrés)*. Ŝi ankaŭ tradukis francan la jenajn librojn: *Zamenhof-Strato* de Roman Dobrzyński, *La Ŝtona Urbo* de Anna Löwenstein, *Kiam mi estis la plej feliĉa en mia vivo* de Julia Sigmund.



# El nia libroservo

## Informoj



⇒ la libroservo partoprenos la venontan komunan semajnfino en Strasburgo la 10/12ajn de majo 2019.

La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France Est : [esperanto.france.est.free.fr](http://esperanto.france.est.free.fr). Se iu precipe allogas vin: avertu min per retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata aĉeti ĝin)!

Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias

[libroservo.efe@laposte.net](mailto:libroservo.efe@laposte.net)




## Nove alvenintaj libroj




①



②



③




④




⑤



⑥



⑦



⑧



⑨

- 1) **Lorenaj fabeloj, Fabeloj**, Opo, Kava Pech, 2018, . 15 €. 11 lorenaj fabeloj en platingvo kaj esperanto (traduko de Benoit Philippe).
- 2) **La ŝtono de la amo**, Poezio, Sali Baŝota, Kava Pech, 2017, 396p, 19,50 €. Poezio kaj poezia prozo de elstara poeto de Kosovo.
- 3) **Francisko Valdomiro Lorenz**, biografio, Vlastimil Novobilsky, Kava Pech, 2017, 160p 13,50 €  
Pri la vivo de grava ĉeĥa esperantisto.
- 4) **Pri la eklezio, Religio**, Jean Hus, Kava Pech, 2018, 88p. 8,70 €. Elektitaj ĉapitroj el la plej grava verko de la fama ĉeĥa teologo kaj antaŭluterana reformisto.
- 5) **Aliroj al Esperanto**, Esperantologio, Kiselman/Corsetti/Dasgapta, Kava Pech, 2018, 230p, 16,50 €. Poezio kaj poezia prozo de elstara poeto de Kosovo.
- 6) **Granda Esperanta-ĉeĥa vortaro**, vortaro, Vmiroslav Malovec, Kava Pech, 2017, 584p 27 €. 16 000 kapvortoj kaj 40 000 vortderivaĵoj,
- 7) **Gramatiko de la ĉeĥa lingvo, Fabeloj**, Opo, Kava Pech, 2007, 28p . 1,80 €. Pri ĉeĥa gramatiko kaj prononcado de ĉeĥaj vortoj.
- 8) **Esperanto od A do Z**, Lernolibro, Petro Chrdle, Kava Pech, 2016, 200p, 10,80 €. Por memlernantoj kaj progresantoj.
- 9) **Brel en Esperanto**, kd-ro, Jacques Brel, Vinilkosmo, 2018, 15 €. 13 kanzonoj de Jacques Brel kantataj esperantlingve de la Kompanoj.

### Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon
  - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
  - per ret-poŝto al "[libroservo.efe@laposte.net](mailto:libroservo.efe@laposte.net)" - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
3. pagenda (indikante fakturnumeron) ĉu per:
  - franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
  - poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0199772W NANCY"
  - interbanka ĝiro al "Esperanto France Est"**IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.**

<i>Mendilo</i>	Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino	
En	Subskribo:

# Zamenhof-festo en Frajburgo 15a de decembro 2018

Laŭvice niaj trilandaj Zamenhof-festoj okazas en la 3-landlima regiono: Germanio, Svislando kaj Francio. Respektive en la urboj Frajburgo, Bazelo kaj Miluzo.

Ĉi-jare la grupo de Frajburgo invitis la samideanojn. Tute oportune estis proponita rendezuo en la ĉefa stacidomo de Frajburgo je la 11a30, al kiu plej multaj veturis trajne. Tie renkontiĝis preskaŭ tri-deko da samideanoj el tiuj lanlimaj regionoj.



De tie ni promenis al la Colombi-Schloessle (Kolombi-kasteleto). Temas pri arkeologia muzeo. Tie la unuaj eltrovaĵoj estis de la paleolitiko 10.000 a.K.

Ni ne nur vizitis salonon post salono, sed ankaŭ kvazaŭ vojaĝis de tiu epoko ĝis la epoko de la romianoj je 100 p.K. Interesa broŝuro en Esperanto kun faka vortaro estis disdonita al la vizitantoj, krome Ursula kaj Alois tradukis al Esperanto la abundajn ricevitaĵajn klarigojn.

Certe laŭ arkeologia taksado troviĝas en tiu muzeo tre **v a l o r a j** trezoraĵoj, kiujn la gvidantino bone emfazis:

Vitra bovlo, blua kruĉo..ktp.

Poste estis proponite manĝi en afgana restoracio, kiun ni atingis post iom da promonado.

La grupo de Frajburgo disponas pri salono en loko nomata "Treffpunkt" ĉe Schwabentor-Ring 2.



Tie ni estis invitataj por kafumado. Sur la tabloj jam abundis diversaj dolĉaĵoj; sezonaj frandaĵoj kaj estis proponitaj teo kaj kafo.

**Poste okazis kelkaj prelegetoj:**

Julia prelegis pri eldiraĵoj de Charlie Chaplin: *Kial mi amas min.*

**Edmond** prezentis la lingvan

situation en Alzaco kaj la evoluon de la instruado de la germana lingvo, kiun li mem spertis en sia profesia vivo.

**Manfred** parolis pri Burundio, unu el la plej malriĉa lando en Afriko. Li klarigis pri la bezono subteni la Esperanto-grupon por akiri terenon.



Ni dankis al la organizantoj de tiu agrabla internacia renkontiĝo, kiu refoje donis la okazon retroviĝi inter geamikoj.

Andreo



## Impresoj pri Vieno

Saliko el Finnlando estis amikino de Ginette. Jen pri kio ŝi deziris raporti al Ginette kaj samokaze kompari Finnlandon al Aŭstrio kaj ĉefe ties ĉefurbon Vieno

Fine de novembro mia amikino Kerstin kaj mi pasigis 4 tagojn en Vieno. La vojaĝo de finna agentejo kostis 699 eŭrojn, inkludis la flugojn (2 x 2½ horojn) aŭtobusan rondveturadon kaj duhoran piedan promenadon en la malnova viena centro, dulitan ĉambron kun 3 matenmanĝoj kaj 3-tagan bileton por la publika transporto.

La vetero estis milda, sen neĝo, glacio kaj pluvo. La ĉiĉerono diris, ke kelkfoje okazas tre malagrablaj fortaj ventoj kaj frostoj, sed ne nun okazis. En la vendoplaco mi vidis jakojn, mantelojn kaj puloverojn kun pluŝa subŝtofo, tre varmajn. Eĉ ne en Finnlando oni uzas tiajn. Preskaŭ ĉiu ĉapeto surhavis pelto-tufon. Tamen verdis kelkaj folioarboj kaj herbejoj, floris la lastaj rozoj. Staris rekta la alta flaviĝinta fragmitaro ĉirkaŭ la statuo de la aŭtoro de nia internacia lingvo. Sur la pedestalo legeblis mencio pri la Esperanto-muzeo en Hofburg.

La muzeo estas parto de la Aŭstra Nacia Biblioteko. La muzeo, kvankam malgranda, enhavas : 60 postlasaĵojn (i.a. de Kalocsay, Schamanek, de Seabra, Seriŝev, Sirjaev, Wüster), 1.500 afiŝojn, 3.700 revuojn (diversaj titoloj), 22.000 fotojn, 35.000 volumojn kaj 40.000 flugfoliojn. El tiuj fine de 2018 estas ciferecigitaj kaj konsulteblaj en interreto: 1.200 libroj, 1.200 jarkolektoj de revuoj kaj 1.000 afiŝoj. Dum nia vizito ni tie renkontis s-ron Christian Cimpa, kies tasko estas skani fotojn kaj ciferecigi la materialon kun priaj informoj en la reto. Feliĉe Kerstin povis iom helpi lin pri kelkaj nekonataj vizaĝoj, nome, ŝiaj patro kaj onklo kaj kelkaj aliaj. Mi deziris vidi jam forpasintajn finnajn esperantistojn, kiujn mi neniam renkontis. Tio eblis kaj ege plaĉis al mi. La muzeo estas ne nur pri Esperanto sed ankaŭ pri aliaj planlingvoj. Vizitas ĝin ĉ. 20000 interesatoj jare, la plejmulto ne esperantistaj, kiuj pagas la eniron en ĉiuj muzeoj de Hofburg aĉetante unu bileton!



Vieno havas preskaŭ du milionojn da loĝantoj. Ĝi estas dividata en 23 partojn, el kiuj numero 1 estas la plej multekosta. Tie la loĝejoj kostas dekoble kompare kun la plej foraj urbopartoj. La urbo daŭre konstruigas lueblajn loĝejoj, la majoritato de la loĝantaro ne deziras aĉeti hejmon sed lui. Tial al ili restas mono por elspezi kaj ĝui dum la vivo. Vieno ja estas nomata gaja urbo, kie gravas arto, muziko, ekspozicioj, distraĵoj. Tia estas la "Wiener Lebensart", la viena maniero vivi. Pli ol 70 % el la loĝantoj estas katolikoj, la preĝejoj estas preskaŭ ĉiam malfermaj, mi tie vidis preĝantojn frumatene. La vendejetoj en la teretaĝo de la domegoj estas fermitaj dimanĉe. Nur kelkaj grandaj vendejaroj malfermiĝas ankaŭ en religiaj festotagoj, kiuj en la kalendaro restas ĉe siaj malnovaj datoj. Oni ne transigis ilin al semajnfinaj sabatoj, kiel oni ekzemple mialande faris.

Bildojn pri la belega, historie varia arkitekturo vi facile trovos en la reto. Mi rakontas nur pri unu eksterordinara domo, Hundertwasser, planita de Friedenreich Hundertwasser (1928 - 2000). Tie la plankoj kaj muroj ne estas ebenaj kaj rektaj, la kolonoj havas interesajn diversdikajn kaj kolorajn partojn. En la murojn la arkitekto metigis tunojn da tero kaj plantigis dekojn da arboj. Nun en la teretaĝo troviĝas vendejetoj, kafejo, sed pli alte 52 lueblaj loĝejoj.



La stratoj kaj metroo-stacioj de Vieno estas puraj, sen ruboj kaj grafitioj. Eĉ ne cigaredstumpoj videblas, kvankam troveblas tabakvendejoj kun cigaroj, cigaredoj, pipoj. Parkojn kaj placojn ornamas imponaj statuoj, inter ili Mozart blanka kaj Mozart ora. Troveblas preĝejo, kie Schuberto estis benita kaj funebrita, troveblas placoj de Herooj, de Herbert v. Karajan, troveblas nekalkuleblaj ligoj al la pasinteco, al gravaj regantoj, soldatoj kaj historiaj eventoj. Ĝuste nun okazis grandaj ekspozicioj pri la franca pentristo Claude Monet kaj la nederlanda Pieter Bruegel (1564 - 1638). Jam en la flughaveno oni vidis

reproduktaĵojn de la verkoj de tiu lasta. Al lia ekspozicio ni ne iris, ĉar ni devintus stari en vico pli ol unu horon. Anstataŭe ni ĝuis la gvidadon de Evgeni Georgiev, unu el la redaktoroj de la revuo *Monato*. Vespere li kondukis nin al Heurigen-restoracio ekster la urbocentro. Tie ni sidis en plenpakita manĝejo kamparaneca trinkante novan blankan vinon ( enhavas malmulte da alkoholo), gustumante tradiciajn aŭstrajn pladojn. De la plafono pendis vinberaj grapoloj en ornama krono kaj de sur la pordo Jesuo krucumita nin protektis. Oni ŝmacis, babilis, ridis, la etoso estis amikeca kaj senstresa, la benkoj kaj tabloj malnovaj, iom krudaj.

Tre pensigan ekspozicion ni vidis en Weltmuseum (muzeo pri la kulturoj kaj etnoj de la mondo) La ekspozicio nomiĝis Kaptuko. Ĝi klarigis, kiel la tukoj kaj vualoj estis kaj estas uzataj pro sociaj, religiaj kaj politikaj kialoj kaj por ĉiaj celoj, ekzemple por reklami aŭstran turismon.. Tra la tempoj precipe viroj provis ĉie kontroli kaj regi la virinan korpon. De la plafono pendis kvazaŭ dancanta malpeza punta virinforma aĵo, la celo de amo, admiro kaj seksa pasio.

Sabate ni vizitis grandegan legomo- kaj fruktobazon, kie ĉiu vendisto proponis, ke ni gustumu, alproksimiĝu, rigardu, provu. En unu fino la legombazaro ŝanĝiĝis en pulobazon. Tie oni vendis brokantaĵojn, artaĵojn, paperaĵojn, vestaĵojn, ujarojn... Malfacile imagi, kion oni ne vendis tie. Kaptis mian atenton barataj koloraj tukegoj maldikaj, sur unu bildo pri dio Ganeŝo, sur aliaj pavoplumoj aŭ aliaj orientaj simboloj. Kelkaj vendantoj estis enmigrintoj. La ŝoforo de nia nokta taksio estis el Bifro. En famaj kafejoj/restoracioj oni vidis brunhaŭtajn gekelnerojn. Kelkloke ili estis vestitaj en nigraj aŭ blankaj tradiciaj kostumoj aŭ uniformoj. La plafono de la kafejo povis esti el volboj kiel en preĝejoj. La pasinteco regas kaj spicas la nunon.

Grandaj Julfoiroj etendiĝis ĉe la malnova urbodomo, kastelo Schönbrunn kaj aliloke, kie ne staras ĝenaj konstruaĵoj. Ni vizitis la Julfoiron ĉe la urbodomo dum taglumo kaj en nokta malhelo, kiam la lanternoj kaj Julaj lumoj plej bele brilis. Tie ni vidis dekon da kripoj konstruitaj de la viena kripocieto, elektre glaciigitan/-atan sketejon, karuselon, sennombrajn budojn vendantaj punĉon, spicitan varman vinon, kaŝtanojn, kolbasetojn, bakitajn terpomegojn plenigitajn per salaj bongustaĵoj. Kiam ni estis manĝantaj niajn terpomegojn, venis maldika brunhaŭta junulo almozpeti. Ankaŭ ĉe la sketejo samspeca junulo, kun granda simpatia rideto, deziris esti helpata. Oni avertis nin pri poŝtelistoj, sed oni diris ankaŭ, ke ĉie en la stratoj kaj parkoj estas sekure promeni.

En la vienaj imperiestraj kasteloj Hofburg kaj Schönbrunn siatempe la imperiestroj multe influis, i.a. Franz Joseph la Unua kun sia edzino Elisabeth (Sissi). Ambaŭ evidente suferegis de siaj rolo kaj devoj. Hofburg konsistas el 1200 ĉambroj. Nun turistoj el ĉiuj mondopartoj inundas la salonojn, laborĉambrojn, dormoĉambrojn, gapas, miras, profitigas al la urbo. Parto el la ĉambroj fariĝis muzeoj, bibliotekoj kaj koncertejoj. La malnovan eksteraĵon oni konservas, la enaĵojn adaptas al nunaj bezonoj. La ruinoj de la militoj oni restaŭris.

En mia koro mi komencis senti min tre malgranda kaj fremda. Certe ni finnoj postrestas centojn da jaroj malantaŭ la evoluo de tia metropolo kia Vieno. Al ni mankas multo, se iu venas tien ĉi por serĉi belajn monumentojn, spurojn da politika historio, abundon da artaĵoj, trinkaĵoj kaj manĝaĵoj. Kampare niaj domoj estis lignaj, ili ofte forbrulis, same en la malnovaj kvartaloj de la urboj. Nia historio kiel ŝtato longas nur 101 jarojn. Ni ne havas multajn kastelojn kaj palacojn, katedralojn. Kion ni havas?? - Nian proksiman rilaton al la naturo, niajn arbarojn, pli ol centdudek mil lagojn, grandajn marĉojn, borealajn plantojn kaj lumojn, esceptan somerlumon. Ĝis 1990 ni havis belajn blankajn vintrojn, sed la klimatsanĝiĝo jam influas. Ni devus defendi nian naturon, protekti nian medion, konatigi la turistojn kun tio, kion oni povas trovi nur en Nordio, eĉ nur en Finnlando. Neniam ni kapablos konkursi kun la urbaj vidindaĵoj de urbegoj kaj malnovegaj kulturoj. Ni elektu alian kategorion, alian serion, kaj ni zorgu pri ĝi same fiere kiel Vieno zorgas pri si, siaj historio kaj loĝantoj.

Saliko





## Théophile CART (1855 – 1931)

**Dum deĵorado en la vilaĝo de la libroj Fontenoy-la-Joute kun niaj gesamideanoj de la Nancy-a grupo, mi uzis paŭzon por viziti antikvaĵiston lokan, kiun indikis al mi nia samideano Jacques HERLÉ. Kaj jesja, mi trovis tie serion da poŝtkartoj, kiuj portretas karikature famajn francajn esperantistojn. Tiujn poŝtkartojn (desegnoj de Jean Robert) mi retrovis en iuj priaj artikoloj ĉe Vikipedio. Jen kelkaj informoj – laŭ Vikipedio – pri Theophile CART. E. L.**

La franca esperantisto Théophile CART naskiĝis la 31-an de marto 1855 en Saint-Antoine-de-Breuih (Departemento Dordogne). Li jam estis antaŭtempa ERASMUS-STUDENTO! Li studadis en Bazelo, Berlino, Romo kaj Parizo. Pro lia malfermiteco al lingvoj – li parolis 7 lingvojn-la franca registaro sendis lin al Svedio por instrui la francan beletron en la universitato de Upsalo (1891 – 1892). Poste kaj ĝis 1921 li instruis en Parizo, en la kolegio Sainte Barbe (la plej malnova kolegio de Parizo), en la Alzaca Lernejo de Parizo, en la liceo Henri IV, kaj ekde 1893 en la Lernejo pri Politikaj Sciencoj. Dume li prezidis la Lingvistikan Societon.

### Esperantistiĝo

Cart ricevis gramatikon de esperanto jam en 1894, sed li lernis la lingvon nur post apero de artikolo de Bourlet en Revue du Touring Club, en 1901. Cart tuj komencis aranĝi diversajn kursojn kaj publikigis lernolibrojn pri Esperanto, per kiuj li altiris atenton. Tiuj ĉi estis tradukitaj en multajn lingvojn. Cart administris la Presan Esperanto-Societon, kiu eldonis la revuon Lingvo Internacia. Li skribis en tiu gazeto, poste direktis ĝin (ekde 1907), dediĉante al tiu tasko, en teruraj malfacilaĵoj, ĉiujn siajn fortojn kaj rimedojn. En la jaroj 1905 ĝis 1909 li estis vicprezidanto (1905-09), poste li iĝis prezidanto (1909-12) de la franca Société pour la propagation de l'Espéranto. Ekde la fondo Cart estis ano de Loka Komitato kaj de la Akademio de Esperanto.

Li estis direktoro de la Komisiono pri komuna vortaro (1908) kaj prezidanto de la Akademio (1920).

Kvazaŭ nelacigebla apostolo li skribis en multaj esperantogazetoj, paroladis ĉie kaj propagandis kaj batalis por Esperanto dum tridek jaroj. Ĉiuj konis la respektigatan “Blankbarbulon”, kiu ĉiam viglis kaj june spritis. Sed sur du kampoj li pli speciale batalis: jam en 1903 li komencis sian porblindulan agadon. Li komprenis, ke nur lingvo internacia povas iom mildigi la teruran izolecon de ĉiulandaj blinduloj, kaj li kreis la brajlan gazeton Esperanta Ligilo (1904).

### La fundamentisto

Sed precipe li estis la “Fundamentisto”. Sian plej grandan meriton li akiris dum la kriza tempo 1907-08, kiam la apero de Ido minacis disigi la esperantistojn kaj ruinigi la movadon. Li metis sian tutan energion, kapablon kaj temperamenton en la kontraŭbatalon de la skismo kaj sukcesis, dank'al siaj insistaj korprenaj admonoj. De tiam, kaj poste kiel prezidanto de la Akademio, li senĉese bataladis kontraŭ ĉiu ŝanĝo en la lingvo, kiu-laŭ lia juĝo-ne estis la rezulto de natura evoluo. “Ni fosu nian sulkon!”, jen lia ĉiama konsilo, kiu signifis: “Ni laboru, restante fidelaj al nia senŝanĝa Fundamento”. Dum tiu batalo li konfrontiĝis eĉ kun kelkaj inter siaj amikoj, faris gravajn personajn oferojn, sed ne cedis eĉ unu colon. Li akre kaj daŭre kritikis la alfluan de novaj vortoj, kiujn alportis precipe la tradukoj de L. L. Zamenhof, Antoni Grabowski kaj Kab. Li interalie prognozis: “*Tiu sistema, senlima kaj sentima pliriĉigo kondukos al tre rapida disfalo de esperanto en naciajn dialektojn! Post kelkaj jaroj la lingvo de la Fundamento fariĝos tiel arĥaika, se ni ne haltos, ke ĝin ne plu komprenos la novaj esperantistoj*” (Lingvo Internacia/Marto 1912). Théophile CART ankaŭ atakis vortaristojn; 1911 en Lingvo Internacia li resumis la Esperantan-francan vortaron de Émile Grosjean-Maupin per la vortoj: “*Tiu vortaro estas ne nur malbona vortaro, sed ankaŭ malbona ago*”.

1912-13, inter aliaj esperantaĵoj de sia Esperanto-Oficejo en Lyon (36, strato Victor-Hugo), Francio. Nuntempe oni tamen konas neniun informon pri la artisto de tiu serio, kiu produktis desegnaĵojn por multaj karto-eldonistoj en la 1910-aj kaj 1920-aj jaroj. Liaj karikaturoj estas inter la plej konataj E-



bildkartoj eldonitaj de “A. FARGES”. **Alice-Leontine FARGES** (farĵ), francino. Ŝi naskiĝis la 22-an de januaro 1869 en Couloutre (apud Nevers). Ŝi fondis en Liono (1910) la “E-istan Hejmon”, malfermitan al ĉiuj E-istoj kaj direktis E-Oficejon de 1908. Ŝi eldonis E-ajn glumarkojn, juvelojn E-ajn, ktp. . . . Ŝi ankaŭ propagandis ĉe komercistoj, kiuj uzadu Esperanton. Ŝi krome organizis propran budon ĉe Foiro de Liono.

**La karikaturaj Esperanto-kartoj** de la desegnisto Jean-Robert estis kreitaj en 1911 laŭ komisiono de Alice-Leontine Farges, kiu ilin eldonis kaj vendis en 1912-13, inter aliaj esperantaĵoj de sia Esperanto-Oficejo en Lyon (36, strato Victor-Hugo), [Francio](#). Nuntempe oni tamen konas neniun informon pri la artisto de tiu serio, kiu produktis desegnaĵojn por multaj karto-eldonistoj en la 1910-aj kaj 1920-aj jaroj. Liaj karikaturaj estas inter la plej konataj E-bildkartoj eldonitaj de “A. FARGES”. **Alice-Leontine FARGES** (farĵ), francino. Ŝi naskiĝis la 22-an de januaro 1869 en Couloutre (apud Nevers). Ŝi fondis en Liono (1910) la “E-istan Hejmon”, malfermitan al ĉiuj E-istoj kaj direktis E-Oficejon de 1908. Ŝi eldonis E-ajn glumarkojn, juvelojn E-ajn, ktp. . . . Ŝi ankaŭ propagandis ĉe komercistoj, kiuj uzadu Esperanton. Ŝi krome organizis propran budon ĉe Foiro de Liono.



(Karaj gelegantoj, vi, nuntempaj geesperantistoj, provu respondi al la demando: ĉu nia eminenta pionira samideano pravis pri la evoluado de la lingvo?)

## Ilona Koutny ricevis la Esperanto-Kultur-premion de la urbo Aalen, Germanio, kaj de FAME-fondaĵo.

La premio, kune kun 3 mil eŭroj, estis solene transdonita al Profesorino Doktorino Ilona Koutny de la ĉef-urbestro Thilo Rentschler je la 20a de Oktobro en la urbodomo de Aalen. Aldone al la solenaĵo estis prezentita furioza akordiono-konzerto, kaj poste bufedo.

Ŝi estras la departementon pri Interlingvistikaj Studoj je Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznan, Pollando; tie ankaŭ eblas studi de ekstere kun ĉeestaj kursoj dum la ferioj.

Ilona Koutny venis de la Eötvös-Lorand-Universitato en Budapesto kie ŝi laboris pri interlingvistiko kaj perkomputila lingvo-prilaboro, krome instruis Esperanton – tie oficiale agnoskita kiel dua aŭ tria lingvo. Ŝiaj trilingvaj



Ilona Koutny



Thilo Rentschler Andreas Emmerich Ilona Koutny



Katalin Kovats Utho Maier Ilona Koutny

temaj vortaroj estas ĝenerale konataj.

Ŝi estis laŭdita de Peter Zilvar, estro de la Interkultura Centro Herzberg, kaj de D-rino Katalin Kovats, kiu 2016 ricevis ĉi-tiun premion kaj fake kunlaboras kun ŝi. Utho Mayer tradukis ŝian kontribuon; li kaj Karl Heinz Schaeffer de la Germana Esperanto-Biblioteko Aalen ricevis la

Raporto de Manfred Westermayer,  
Fotoj de Gerold Busch  
pliaj detaloj: [eo.wikipedia.org](http://eo.wikipedia.org) > Kulturpremio

## Renovigo de Esperanto en Burundio

Eble kelkaj rememoris la libron de Tereza Kapista kiu en 2005 vizitis Burundion kaj instruis dum kelkaj monatoj Esperanton en Rumonge, borde de la Tanganjika-Lago. Pri tio ŝi verkis la libron: "Esperanto - Lingvo de Paco en Burundio - Afriko".



2014 okazis la inaŭguro de la Eo-Centro Rumonge kun 2 konstruaĵoj: la granda enhavas salonon apud la biblioteko, krome oficeja ĉambro kaj necesejo; la malgranda konsistas el du klas-ĉambroj por instrui. Tie okazis renkontiĝoj kaj instruado. La biblioteko ricevis ĵurnalojn, literaturon kaj lernolibrojn por Esperanto.

En Majo 2018 alvenis peto de Johan DERKS kiu kunfondis la Esperanto-Centron Rumonge, sidejo de ANEB (nacia asocio pri Esperanto en Burundio) kaj de samideanoj Aimé- Patrick MANIRAKIZA (oficisto pri informadiko) kaj Hassan NTAHONSIGAYE (instruisto), nunaj estraranoj de ANEB.

Sed nun necesus grava riparo de truo en la tegmento, kaj ĝenerala renovigado. Dank' al financa subteno flanke de Esperanto-en-Evoluo la juna teamo riparos la tegmenton, purigis kaj plibeligis la centron. Bona rekomenco.

Tamen alia problemo atendas nian subtenon: kiam oni konstruis la Esperanto-Centron ĝi situis je la rando de (planita) strato; sed la urbo ŝanĝis la vojon iomete (supozeble pro aliaj konstruaĵoj ?) Pro tio necesas al-aĉeti teron ĝis la nun ekzistanta strato. Bedaŭrinde la urbo Rumonge ne povas aĉeti tiun teron kaj ludoni ĝin al la Esperanto-Centro.

Por enspezi monon por vivteni la centron, ANEB decidis instali infanĝardenon en la malgranda konstruaĵo kun du klasĉambroj. Por tio avantaĝe estus la nova tereno, ĉar infanoj bezonas ankaŭ spacon por moviĝi.

Krome sur tiu tereno eblas prezenti ekologiajn teknikojn (planti legomojn, sun-energio por



kui, por kurento kaj pli-efika kuir-forneto kiu reduktas la bezonon da ligno). Tiu tereno (33m x 17,4m) kostas 3500 eŭroj, iomete pli ol la nuna (15,5m x 23m). Esperanto-en-Evoluo jam kolektis preskaŭ mil eŭroj kio ebligas antaŭpagi la aĉeton por ne perdi la aliron al la Eo-Centro. Hazarde la germana federacia lando Baden-Virtembergo estas ĝemelita kun Burundio, kio ebligas ricevi subtenon por instali la infanĝardenon kaj aliajn edukadajn kaj kulturajn agadojn en la Eo-Centro Rumonge; sed ili ne subtenas aĉeton de tereno. Pro tio ni petas vin subteni la aĉeton de tiu tereno.

Antaŭ nelonge BAVELO (Baden-Virtemberga Esperanto Ligo) decidis kunlabori kun la Esperanto-Centro Rumonge kaj kun ANEB. Unu el la lernantoj de Tereza Kapista estis Nestor, katolika teologo, kiu nun laboras pri rilatoj inter teologio kaj ekologio en Freiburg/Breisgau; kaj tiel ni havas pli rektan kontakton kun Burundanoj.



Historia retejo de Eo-Centro Rumonge: [esp-evoluo.info](http://esp-evoluo.info)

Aktuala prezentado de la projekto: [verduloj.org/afriko.htm](http://verduloj.org/afriko.htm) > Burundio

Ankoraŭ mankas 2500 eŭroj por aĉeti la teron, kio estos posedaĵo de ANEB.

Se vi pretas subteni, bonvolu uzi la konton de BAVELO en Villingen.

IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22, BIC: SOLADES1VSS

Ankaŭ eblas subteni al la UEA-konto de Esperanto en Evoluo: [eeer-u](mailto:eeer-u)  
Bonvolu noti: "Rumonge" kaj vian nomon.

Por pliaj demandoj, bonvolu skribi al la aferviganto pri Burundio de BAVELO, [Manfred@Westermayer.de](mailto:Manfred@Westermayer.de)



**Nia foto-paĝo:  
Aŭtunaj koloroj  
en Alzaco,  
pli flavaj  
kaj en  
Suda Koreio,  
pli ruĝaj**

